

J E F O

**JUNULARA
ESPERANTISTA
FRANCA
ORGANIZO**

JeunEspéranto-France

4bis, rue de la Cerisaie
75004 PARIS

www.esperanto.org/jefo
ou tt.t.esperanto.org/jefo

Direktoro de la eldono /
Directeur de la publication :
Karine Texier

Redaktora teamo / Équipe de rédaction :

Philippe Bérizzi
Karine Texier
Magali von Blotnitz
Michaël Simon
Didier Loison
Laurent Vignaud
Alain Fagot
Charlotte Lafon

Enpaĝigo / Mise en page :
Tony Guyot

Desegnaĵoj / Illustrations :
Henri de Sabates (p. 3)
Karine Texier (aliloke)

Fotokopirado kaj sendado /
Photocopies et envois :
Laurent Vignaud

Preparis la dosieron /
Ont préparé le dossier :
Karine Texier
Magali von Blotnitz
Rozenn Picard
Charlotte Lafon
Jean-Marc Bruno

Ankaŭ kontribuis al tiu numero /
Ont également contribué à ce numéro :
Alain Fagot
Didier Loison
Laurent Vignaud
Xavier Godivier

Dankon al ĉiuj!
Ankaŭ dankon al Bruno Flochon pro
siaj valoraj teknikaj konsiloj.

Fotokopita komence de aprilo je 350 ekzempleroj.
Por aliĝi al JEFO kaj ricevi regule tiun bultenon, ple-
nigu kaj sendu la aliĝon en la centraj paĝoj. La arti-
koloj en JEFO informas reliefigas la vidpunktojn de
ties aŭtoroj, ne nepre tiun de JEFO. Tamen JEFO
permesas al si la rajton publikigi aŭ ne tiujn artikolo-
jn. Represajoj estas permesataj, kondiĉe ke oni indi-
ku la nomon de la aŭtoro kaj la fonton kaj ke JEFO
estu informita.

Photocopié début avril à 350 exemplaires. Pour adhérer à
JEFO et recevoir régulièrement ce bulletin, remplissez et ren-
voyez le bulletin d'adhésion situé en pages centrales. Les
articles parus dans JeunEspéranto Info n'engagent que leurs
auteurs. Toutefois, JEFO se réserve le droit de les publier ou
non. Tous droits de reproduction autorisés sous réserve de
l'indication de l'auteur et de la source et sur simple informa-
tion à JEFO.

ISSN : 265 3853

Le mot de la présidente

Île paradisiaque, soleil printanier, tablettes de cho-
colat à gogo... Ah que tout cela est loin ! Le week-end
des membres de JEFO date déjà de plusieurs
semaines mais mon esprit nostalgique n'arrive pas à
oublier cette ambiance de vacances !

Quand je pense que certains d'entre vous n'étaient
même pas là quand nous avons soufflé les bougies de
JEFO ! Et oui ! Avec ses trente ans (depuis janvier
2000), JEFO a acquis la sagesse qui nous fait enco-
re défaut, à nous, jeunes pleins d'enthousiasme et de
folie...

Mon vœu pour le début de cette nouvelle décennie de
Espéranto-Jeunes serait que tous vous trouviez
votre place, chacun selon ses centres d'intérêt et de
plaisir. Que personne ne s'ennuie, que personne ne se
sente "contraint"... Que notre joyeuse équipe
s'agrandisse toujours et qu'elle s'amuse de plus en
plus à faire bourgeonner l'espéranto sur la planète.

Bonne chance à tous... et n'oubliez pas de commencer à pla-
nifier vos vacances d'été : Hong-Kong, Tel-Aviv, Saint-
Chamond ou Helsinki... et encore bien d'autres possibilités !

Karine (jefo@esperanto.org)

Pour écrire au journal :

liste ji-teamo@club.voila.fr

OU

Espéranto-Jeunes — équipe du JI
4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris

Pour le prochain numéro, le dossier sera :
l'écologie. Envoyez vos contributions.

ÉDITORIAL

Salut à toutes et à tous,

Voici le premier *Jeune Espéranto-Info* de l'année 2000. Avec lui, deux différences notables apparaissent. Tout d'abord, il n'y a plus un rédacteur (ou une rédactrice) mais toute une équipe de rédaction. Ceci afin d'améliorer la qualité de votre revue favorite. Alors, attention de ne plus envoyer vos contributions à un individu particulier mais à l'adresse indiquée en bas de la page précédente.

Ensuite, vous trouverez dorénavant un dossier traitant d'un thème particulier à chaque numéro. Ce thème ne traite pas forcément uniquement d'espéranto, mais aborde des sujets en rapport avec les valeurs défendues par la langue internationale. Dans ce numéro de la page 7 à la page 11, le thème est consacré à la solidarité et à l'aide humanitaire (« *Solidareco kaj Humanitara Helpo* »). On y aborde des sujets aussi divers que le commerce équitable ou la peine de mort. Vous découvrirez aussi quels sont les projets de l'espéranto —et en particulier de *Jefo*— dans ce domaine.

Mais bien sûr aussi comme d'habitude, vous pourrez y lire toutes les informations concernant la vie de votre association. Vous allez vous apercevoir qu'en ce moment *Jefo* déborde d'imagination et propose une multitude de projets très ambitieux. Mais, chhhh, je n'en dis pas plus. A vous le plaisir de découvrir tout ça par vous-même dans les pages suivantes. Bonne lecture.

Tony

Contenu

Les brèves	4
ToToTo	5
IJK2001	6
dossier	
Mortkondamnito	7
Belgrado	7
Commerce équitable	8
Asocio Max Havelaar	9
Solidaraj Tagoj	10
Victimes de guerre	11
Adresaro	11
Ni legu esperante	12
Regionskale	19
Les actifs de JEFO	20
Le coin du trésorier	23
La photo du trimestre	23
Korespondpetoj	24
Kalendaro	25
Adresaro	26

LA FRENEZA KOKESJO

TEMAS PRI KOKESJO KIE DENT-HAVAS LA KOKINOJ, KOKAS KANGURVO, VEGETARANAS LA VULPCO, KTP...



Eksteren'

Aventure du Bout du Monde est une association qui permet aux voyageurs d'échanger leurs expériences, leurs tuyaux pour mieux préparer leurs périodes à travers le monde. Ils organisent chaque année le festival des Globe-Trotters. Cette année, Espéranto-Jeunes a adhéré à cette association : nous recevons donc leur revue (photos, récits de voyages...) consultable au siège. Nous disposons actuellement d'un numéro sur l'Indonésie et d'un autre sur le Cambodge et le Brésil. Par ailleurs, nous avons fait l'acquisition du « Bobinoscope » annuaire des adhérents d'ABM avec liste des pays explorés par chacun. (Rens.: Karine Texier)

Un jeune vice-président pour la fédé Est ? La fédération « Espéranto France-Est » (qui couvre les régions Alsace et Lorraine) réserve un poste de vice-président pour un membre de JEFO. Un bon moyen de s'investir dans la vie locale sans se couper du mouvement jeune. Si vous êtes intéressés, contactez votre coordinateur régional et Karine Texier.



Nova

Ĉirkaŭ la mondo

Ekde julio 2000, Rachel Prual kaj David Cholet (vidu foton), novaj junaj membroj el Vendeo prenos sian dorsakon kaj Pasportan Servon por vojaĝi ĉirkaŭ la mondo dum du jaroj. Vi legos pri tio en ĉiu JI.

La Krokodileto, internacia revuo por infanoj kreita de Catherine Giangrossi kaj Pascal Lécaille malaperos se neniu volontulas por zorgi pri ĝi. Se tio interesas vin, ili estas pretaj transdoni sian sperton kaj desegnaĵojn... (Inf.: Pascal Lécaille)

La JEFO Butik' vojaĝas!

Céline Bernard, kiu zorgas pri la butikoj de kelkaj monatoj preparis Butik'-valizon por vendi nian varbmateriaĵon ekster Parizo. La ideo venis dum la esperantostaĝo en Loreno: tie JEFO vendis multajn T-ĉemizojn kaj diversajn aliajn aĵojn. Ankaŭ dum la ĵus okazinta IS, Céline kunportis tiun valizon. (Inf.: Céline Bernard)

Nova JI

Ludivine nun zorgas pri Koncize: nova skipo transprenis la taskon prepari por vi la JI. Pluraj aĵoj iomete ŝanĝiĝis (donu vian opinion aŭ partoprenu ĉe ji-teamo@club.voila.fr aŭ ĉe JEFO, rédaction du JI, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris).

Charlotte Lafon el Liono jus prenis plurajn taskojn:

- ŝi nun partoprenas en la teamo, kiu organizas la "Solidarajn Tagojn";
 - ŝi konsentis respondecigi pri la administraj taskoj koncerne "Koncize", via eŭropa gazeto.
- Bonne chance, Charlotte !

Violette Walther, Dávid Hromada, Alain Fagot, Henri de Sabates, Céline Bernard kaj pluraj aliaj JEFO-anoj decidis prizorgi la projekton IJK 2001. Dankon al ĉiuj! (Vidu p. 6)


Popol'

La 10an de decembro 1999 PACSiĝis Didier Loison kaj lia amiko Fredo Saconnet. La JEFO-teamo deziras al ili senliman feliĉon.

La 26an de decembro 1999 forpasis en Sudafriko la bopatro de Magali Von Blottnitz. Ni ĉiuj kondolencas kaj pensas pri ŝi kaj ŝia edzo Harro. Ni deziras al ili la jaron 2000 pli agrabla.

La Reta Vortaro

Depuis quelques mois des espérantophones dispersés à travers le monde collaborent ensemble grâce à Internet pour construire une véritable encyclopédie de l'espéranto : la Reta Vortaro.



La Reta Vortaro est un projet très ambitieux. Son but est de créer un dictionnaire qui sera sur Internet ce que la Plena Vortaro est pour l'ensemble de la communauté espérantiste : une référence de la langue espéranto.

Actuellement, la Reta Vortaro comporte de nombreux mots que vous pouvez découvrir en quelques clics de souris. Vous pouvez faire une recherche par ordre alphabétique en espéranto et également dans 12 autres langues dont le français.

Vous pouvez aussi faire une recherche par rubriques indiquées par des icônes dans la page d'accueil : anatomio, arkeologio, arkitekturo pour les trois premiers par exemple.

Enfin, si vous avez une bonne maîtrise de l'espéranto et du langage XML vous pouvez vous aussi participer à ce magnifique travail ! Pour participer ou simplement consulter la Reta Vortaro, allez à l'adresse suivante :

<http://www.uni-leipzig.de/esperanto/voko/revo>

D'autres dictionnaires très pratiques

Sur le site de *Bernard* : chargez sur votre PC des dictionnaires entre l'espéranto et de nombreuses langues : français, anglais, allemand, basque, etc. (<http://welcome.to/vortaro>). Une fois sur le site, cliquez sur les drapeaux en bas de page pour charger les dictionnaires de votre choix. Vous pouvez aussi retrouver la partie française sur le site de *Freelang* : <http://www.freelang.com/freelang/dictionnaire/esperanto.html>

Sur le site de *Travlang* :

Chargez le dictionnaire multilingue *Ergane* qui utilise l'espéranto comme langue-pont entre de nombreuses langues : <http://www.travlang.com/Ergane/>

Vous pouvez aussi tester ce dictionnaire entre deux langues de votre choix : <http://dictionaries.travlang.com>

Komputada Leksikono

Pour les termes de l'informatique, consultez le komputada leksikono : <http://www.esperanto.mv.ru/KompLeks/LatI>

Alternative Esperanto

Enfin, pour ceux qui n'ont pas froid aux yeux, quelques mots "pas très beaux" traduits en anglais ☺ <http://www.notam.uio.no/~hcholm/altlang/ht/Esperanto.html>

Unicode

De plus en plus de sites utilisent le format Unicode pour représenter les caractères accentués ĉ, ĝ, ..., ŭ. Avec Windows 95/98, vous pouvez installer Unicode très facilement sur votre PC : allez dans **Démarrer/ Paramètres / Panneau de configuration** puis **Ajout-Suppression de programmes** puis **Installation de Windows** et enfin activez l'option **Prise en Charge multilingue**. Pour Windows 95, cochez **Détails/turc**. Pour plus d'infos sur Unicode et les accents : <http://altern.org/esperantio/franca/tiparoj.htm>

Voyage en Espérantie

Depuis quelques mois, je construis un site web



d'information sur l'espéranto en français et espéranto : <http://altern.org/esperantio>

De nombreux sites y sont présentés en 7 rubriques : "pakaĵoj/bagages, babilu/bavardez, servoj/services, aŭskultu/écoutez, legu/lisez, asocioj/associations, personoj/personnes". Vous retrouverez par exemple les adresses présentées dans cette page dans la rubrique "pakaĵoj/bagages".

Ĝis baldaŭ en la reto! ☺ À bientôt sur le net !

Xavier aŭ Zav'

Zav@esperanto.nu
<http://altern.org/zav>



Dum la IJK en Veszprem ekflagris tiu ideo: jam de pli ol 20 jaroj (depost 1977) JEFO ne plu organizis la Internacian Junularan Kongreson en Francio. Kelkaj organizemuloj kolektiĝis kaj depost tiam evoluas la afero; foje ĝojige foje male. Tiu rubriko celos en ĉiu JI raporti pri la stato de tiu asocia projekto.

Teamo

Depost la komitatkunsido novembra kreiĝis retlisto al kiu abonas 15 homoj. Krome aldonendas volontuloj, kiuj ne abonas ĝin. Entute dudeko da entuziasmuloj kunlaboras. Kelkaj taskoj estas klare prenitaj de iuj, dum aliaj iom "vagadas" (kiel ekzemple mi). Tio, kio specifas pri tiu teamo, estas ĝia internacieco. Krom francoj troveblas germanoj, nederlandanoj kaj eĉ ukraino. Tiu IJK2001 iĝos vere internacia kongreso.

Loko

DAVID "VESZKO" HROMADA vizitis dekon da ejoj en Elzaco por trovi tiun, kiu plej taŭgus por gastigi tian larĝan esperantistaron. Tiel decidiĝis pri la junulargastejo "René Cassin" en Strasburgo, kies estroj ŝajnas tre amikemaj kaj kunlaboremaj. Tiu loko estos facile atingebla el la UK en Zagrebo.

Datoj

Ĝuste por profiti la tempan proksimecon de la UK, ni celas organizi nian IJKon de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2001. Tio estos la semajno post la UK.

Buĝeto

ALEXANDRE "ALEKS" KADAR sinproponis por pretigi buĝeton kaj priesplori monfontojn. Malfeliĉe li trovis laborpostenon, kiu malliberigis sian tutan tempon. Tamen ni ĝojas por li, ke interesan laboron li akiris. Do skizan buĝeton pretiĝis DAVID-EMIL "WICKI" WICKSTRÖM. Tion punkton nia teamo ankoraŭ devas pristudi.

Kandidatiĝo

Oficialan kandidatiĝan dosieron ni devos disponigi al TEJO (t.e. HOLGER BOOS, estrarano pri kongresoj) en marto. Dum nia ĝenerala membrokunveno (2000-03-11/12 en Parizo, vidu la tiuteman artikolon en tiu ĉi JI) ĉeestos Holger por helpi nin kaj babili kun

eventualaj aldonaj volontuloj.

Ideoj

SÉBASTIEN "HENRI DE SABATES" ERHARD skizis ideon pri festivalo en urba (strataj artaĵoj). Tiu celos montri al la urbanoj, ke ne nur inter si feliĉas la esperantistoj sed ankaŭ iel kontribuas al la socia ĝojo. XAVIER "ZAV" GODIVIER siaflanke organizos biciklan karavanon helpe de BEMI (internacia asocio de esperantistaj biciklantoj). Se ankaŭ vi deziras alveni la kongreson biciklante (t.e. feriumi jam unu semajnon antaŭ IJK), vi havos tiun ŝancon.

Kunlaborado

En nia teamo, la ĉefa trajto estas kunlaboremo. Neniu estas devigata ion fari. Se akcidente iu ne povas fari tion, kio estis proponita, ne gravas. Se temas pri io grava por la projekto, tiam iu alia transprenas la taskon. Tiel ankaŭ vi estas bonvena kunlabori. Viajn taskojn elektos vi mem. Vian laborritmon elektos vi mem. Se nur surloke vi povos helpi jam antaŭanoncu tion. Se nur dum la antaŭpreparado kaj ne plu surloke vi povos engaĝiĝi, jam sciigu al ni. Se retaliron vi havas, vi rajtas aboni la liston ijk-organizado ĉe <http://club.voila.fr/>. Bonvenon!

Venontaj kunvenoj

Post la kunveno marta, estas jam planita kunveno oktobra (2000-10-13/14) en Strasburgo, laŭeble en la ejo mem. Pri tio vi legos pli en venonta JI.

ALAIN "HAMELEONO" FAGOT




Dosiero SOLIDARECO kaj HUMANITARA HELPO

Dossier SOLIDARITÉ et AIDE HUMANITAIRE

Mortkondamnito

Li nomiĝas Timothy Gribble. Tim por intimoj. Sed ne multajn intimojn li havas. Kiam li estis mortkondamnita en 1989, li perdis multajn geamikojn, kaj por sia ŝtato, Teksaso, li iĝis simpla numero: #929. Mi konatiĝis kun li en 1995, post kiam li petis leteramikojn ĉe Amnesty International, kiu transdonis la peton al alia franca asocio: Agado de Kristanoj por Aboli Torturon (ACAT).

Ekde la unua letero la interŝanĝo fariĝis tre riĉa kaj profunda. Ni ekdiskutis pri niaj vivoj, pri internaciaj eventoj, pri literaturo aŭ pri religio... Mi ofte sendis al li francajn poemojn tradukitajn en la anglan, fotojn, bildkartojn, kiuj iom post iom pligajigis la murojn de lia malgaja ĉambreto. En aprilo 98, li skribis al mi: "Vere tre plaĉas al mi la fotoj kiujn vi ĉiam sendas. Speciale fotoj el Provenco, mi ne scias kie precize ĝi situas, sed ĝi estas belega loko. Mi aparte ŝatas tiun malnovan ŝtonan kastelon sur la maro... Mi konservis ĉiun bildon kiun vi sendis, kaj de tempo al tempo mi rigardas ilin, kaj imagas ke eble iam mi vojaĝos mem tie."



Post kvar jaroj, mi havis oportunecon iri al Usono, kaj decidis kun mia edzo Clément viziti lin. Malgraŭ ĉiaj komplikaĵoj kun la administrantoj de la karceroj, ni sukcesis dum kvar horoj vidi lin. La momento estis tre emociiga kaj interesa. Denove ni parolis pri multaj diversaj temoj, scienco, literaturo, kinarto, milito en Eks-Jugoslavio kaj en aliaj landoj, kaj... pri esperanto! Fascinas lin tiu lingvo, kaj li petis de ni anglalingvajn

informfoliojn, kiujn mi sendis post nia reveno al Francio.

Kiam aperos tiu JL, Tim eble jam ne plu vivos en nia mondo. Li rendevuas kun sia mortigisto la 15an de marto 2000. Kompreneble mi kun membroj de ACAT aŭ Amnesty faros ĉion por malhelpi

tion sed... malgrandas la espero. Tamen eble tiu artikolo ŝanĝos vian rigardon pri mortopuno, kaj instigos vin helpi mortkondamniton. Ne hezitu kontakti min por diskuti pri ĝi (vidu lastan paĝon por miaj kontakteblecoj).

Rozenn



**Ensemble,
agissons pour abolir la torture
et les exécutions capitales**



Kio nova en Belgrado ?

La milito kiu trafis Jugoslavion pasintan jaron jam delonge forgesiĝis... sed ne ĉie! La domoj ne ankoraŭ estas riparitaj, nek la stratoj kiujn bezonus la bazaj komercaj transportoj, nek oni ŝtopis la ekologian katastrofon rezultante de bombdetruado de industrioj... Mia amikino Vesna, de Belgrado, skribas jene pri sia vivo:

(la 17an de decembro)

« De 3 tagoj multe neĝegas ĉi-tie. Multaj homoj en Belgrado havas nur malregule kurenton. Ankoraŭ pli multaj plendas pri malbonaj hejtlecoj. Koncerne mian loĝejon, mi povas diri, ke kiel ĉiam ni havas bonan hejton, kaj ĝis nun regulan kurenton. Sed se vi alparolas Alex, la loĝejaro de ŝia familio havas preskaŭ nefunkciantan hejtadon. Ni ankaŭ havas nek benzinon, nek oleon aŭ lakton. La nura afero, kiun ni multe havas, estas: inflacio, denove... »

(la 3an de januaro)

« De 5-6 tagoj mi estas malsana kaj kuŝas en lito (kiel ĉiuj ĉe mi hejme). Mi nur esperas, ke mia patro kaj mi ne ricevos enflamiĝon de la pulmoj. Mi ne scias, kio ĉe ni okazas, sed laŭ mia memorkapablo neniam antaŭe okazis, ke tiom da homoj samtempe suferas pro gripo. Mi supozas ke estas preskaŭ triono de la tuta urbo. Marko ankaŭ kuŝas en lito, kaj Alex kaj ŝia fianco, same kiel ŝiaj gepatroj hejme. Mi miras, kial oni ankoraŭ ne donis ian ajn klarigon pri tiu stranga epidemio! »

Magali

LA JUSTA KOMERCADO

Unue, komercado estas interŝanĝo de aĵoj kaj de servoj. Tiu ago estas necesega al ĉiuj socioj.

Nuntempe, la firmaoj de la "nordaj landoj"¹ ekspluatas la manlaboron de la "sudaj landoj", eksterscie de la produktistoj kaj de la konsumantoj.

La produktistoj ne konscias ke ili estas ekspluatataj de la nordaj firmaoj. Plie, ili estas sub la arbitro de firmaoj kiuj volas tian produktaĵon faratan je tia maniero, sen respekti la tradician fabrikadon.

Ni, konsumantoj, ne atentis pri niaj aĉetoj, kontentaj se la artikloj respondas al niaj vitalaj kaj libertempaj bezonoj.

Por resumi, oni konstatas pozicion de forto inter la Nordo kaj la Sudo: ekonomie kaj politike, sed ankaŭ socie en la nordaj landoj, ĉar la konsumantoj ne volas aĉeti produktaĵojn pli multekostajn.

De tiu konstato, homoj disvolvis justan komercadon. La justa komercado ebligas al produktistoj vivi digne kaj aŭtonome ĉar ili retrovas la regadon kaj la senson de siaj agoj.

Tiuj homoj aranĝis kontrakton inter la Nordo kaj la Sudo. La nordaj landoj devas labori kun la plej malfavoritaj produktistoj kaj privilegii daŭrajn komercajn rilatojn. Ĉiuj firmaoj devas fiksi por siaj produktaĵoj prezon ebligantan salajrigi siajn kunlaborantojn, doni antaŭpagon por "startigi la maŝinon"; ili devas respekti la tradician produktadmanieron.

Kiel en ĉiu interŝanĝo, la du flankoj devas "doni". Do en la Sudo, la produktistoj devas rezigni pri la sklavigo (la laboro de infanoj, de maljunuloj, de gravedaj virinoj), garanti la kvaliton de la produktaĵo, akcepti la kontrolon de la Nordo kaj certigi la travideblon en la funkcio de la produktejo.

Ĉiu ĉi agado celas:

- krei organizon partoprenema kaj respektema je ĉies libereco,
- forigi la sklavecon,
- privilegii lokajn potencialojn,
- racie uzi la krudmaterialojn,
- kuraĝigi aŭtonomecon,
- disvolvi socian kaj ekonomian medion.

En dua rango, justa komercado disvolvus kulturajn interŝanĝojn.

N.B.: Dum la Solidaraj Tagoj, estos stando kiu klarigos la justan komercadon kadre de la "Festo de l'Homo".

¹ La nordaj landoj estas landoj industriaj kaj ekonomie evoluitaj; la sudaj landoj estas landoj subevoluitaj.

LE COMMERCE ÉQUITABLE

Tout d'abord, le commerce désigne une activité d'échanges de biens et de services. Cette activité est nécessaire à toute société.

Actuellement, les entreprises des pays du Nord¹ exploitent la main-d'œuvre des pays du Sud, à l'insu des producteurs et des consommateurs.

Les producteurs ne se rendent pas compte qu'ils sont exploités par les firmes du Nord. De plus, ils sont à la merci de ces derniers qui veulent tels produits, faits de telle manière sans respecter la fabrication traditionnelle.

Nous, consommateurs, ne faisons pas attention à nos achats, du moment que les articles répondent à nos besoins physiologiques et de loisir.

Pour résumer, on constate une position de force entre le Nord et le Sud : économiquement et politiquement, mais aussi socialement dans les pays du Nord, car les consommateurs ne veulent pas acheter des produits plus chers.

À partir de ce constat, des gens ont développé le commerce équitable qui permet aux producteurs de vivre dignement et en sauvegardant leur autonomie car ils retrouvent la maîtrise et le sens de leurs actes.

Ils ont établi un contrat entre le Sud et le Nord. Les pays du Nord doivent travailler avec les producteurs les plus défavorisés et privilégier des relations commerciales durables. Toutes les firmes doivent fixer pour les produits un prix permettant de salarier les producteurs, donner un acompte pour « lancer la machine » ; ils doivent respecter la manière traditionnelle de produire.

Comme dans tout échange, les deux parties doivent « donner ». Donc dans le Sud, les producteurs sont obligés de renoncer à l'esclavage (le travail des enfants, des personnes âgées, des femmes enceintes), garantir la qualité de la production, accepter le contrôle du Nord et certifier la transparence dans le fonctionnement de l'usine.

Toute cette activité a pour but de :

- créer une organisation participative et respectueuse de la liberté de chacun,
- de supprimer l'esclavage,
- de privilégier des potentiels locaux,
- d'avoir une utilisation raisonnée de la matière première,
- d'encourager à l'autonomie,
- de développer un environnement social et économique.

Dans un deuxième temps, le commerce équitable développerait des échanges culturels.

N.B. : Pendant les Solidaraj Tagoj, il y aura un stand qui expliquera le commerce équitable dans le cadre de « l'Humain en Fête ».

¹ Les pays du Nord sont des pays industriels et développés économiquement ; les pays du Sud sont des pays sous-développés.

La asocio Max Havelaar

La fondaĵo Max Havelaar naskiĝis en 1988 en Nederlando, post alvoko de meksikaj kafo-kulturistoj kiuj postulis pli justajn prezojn por siaj varoj. Poste la asocio disvolviĝis en Belgio, Svisio, Luksemburgio kaj Danio. Similaj iniciatoj aperis ankaŭ en Kanado kaj Britio.

La franca asocio Max Havelaar France estis kreita en 1992, financita per donacoj kaj subvencioj.

Max Havelaar estis heroo de grava nederlanda romano, verkita dum la 19-a jarcento: li denunciis la suferojn de la kafo-kulturistoj en Indonezio, tiutempe nederlanda kolonio.

La celo de la asocio estas promocii egalecajn komerco-rilatojn por la etaj kafo-kulturistoj de Latina Ameriko, Karaibo kaj Afriko.

Tiucele Max Havelaar interrilatigas kafo-kulturistojn el sudaj landoj kun eŭropaj kafo-vendistoj. Tiuj vendistoj akceptas la prezo-kondiĉojn, kaj ricevas la Max Havelaar garanti-markon.

Poste Max Havelaar reklamas en Eŭropo por tiu-ĉi kafo, kaj kontrolas la kondiĉo-respekton.

Max Havelaar elektis kafon por pluraj kaŭzoj. Ĝi estas unu el la plej aĉetitaj bazaj produktoj tutmonde, kaj ĝi eniras en preskaŭ ĉiujn domojn. Plie, en la sudaj produktantaj landoj ĝi estas ekonomie

gravega. La merkaton kontrolas kelkaj grandegaj entreprenoj, la prezoj estas do malstabilaj: tio, kio

endanĝerigas la etajn produktistojn.

Male, por ke komercado estu justa, la du flankoj nepre respektu kelkajn regulojn:

La eŭropaj vendistoj devas aĉeti kafon rekte de la kulturistoj, por tiel ŝpari pagojn al perantoj; pagi laŭ sufiĉe altaj prezoj, sendepende de la


mond-merkata malstabila prezo; subskribi longdaŭrajn interkonsentojn kun la kulturistoj; akcepti konstantan kontroladon de la Max Havelaar-asocioj.



Aliflanke, ankaŭ la kulturistoj devas demokratie organiziĝi en kooperativoj, malfermitaj al ĉiuj novalvenantoj; produkti alt-kvalitan kafon; helpi vigligi la lokan ekonomion aĉetante lokajn varojn.

Tiumaniere, ni ĉiuj povas, lokaskale per aĉetoj de kafo-pakoj, esprimi solidarecon al la sudaj landoj, kaj kontribui al pli justa mono-dispartigo en la mondo.

Jean-Marc



Kio finfine estos la Solidaraj Tagoj?

Verŝajne multaj el vi jam aŭdis aŭ legis la vortojn "Solidaraj Tagoj", ĉu en via revuo *JI*, ĉu okaze de diversaj junularaj renkontiĝoj aŭ kunvenoj. Sed kio finfine ili estos? Tiom da ideoj aŭdiĝis pri tiu projekto, ke vi eble ŝatus starigi tiun demandon. Do jen mallonga klarigo.

La Solidaraj Tagoj estas junulara aranĝo organizata de Jefe, kiu okazos en Saint-Chamond (apud Lyon) de la 30a de junio ĝis la 5a de julio. Ili komenciĝos per festivalo organizata de la urbo mem, nome "L'Humain en Fête" (Festo de l'Hommo), kiu kunigos la 1an kaj 2an de julio multajn solidarecajn asociojn. Kelkaj el ili estas famaj naciaj organizoj: les Restos du cœur ("Restoracioj de l'koro"), Katolika Komitato kontraŭ malsato (CCFD), Terre des Hommes (Tero de la Homoj, tutmonda solidareco), Secours Catholique (katolika solidareco), Ruĝa Kruco. Aliaj estas lokaj asocioj, Saint Chamond Espoir (Solidareco kun malsanaj infanoj), l'Arrafal (solidareco kun Litovio)... Ankaŭ kunorganizas la urbo Saint Chamond, la junulara kultura domo (MJC) kaj socialaj centroj.

Ĉiuj partoprenos en la festo, ĉu per koncerto, ludoj, jonglado kun infanoj, filmoj, ekspozicio, debatoj, frandadoj... Per tiu festo ili ankaŭ provos kolekti iom da mono, ne por si mem, sed por komuna kaso kiu ebligos poste realigi humanitaran projekton.

La esperantistoj partoprenos en tiu festivalo kiel ĉiuj aliaj asocioj, per koncerto (de JoMo), vendado (interalie de internaciaj manĝaĵoj), esperanto-kursoj, kontribuo en la debato, ktp. Ankaŭ estos ebleco helpi aliajn asociojn, prizorgante infanojn ekzemple. Do ĉi trovos ion laŭ sia gusto kaj intereso!

Kaj post tiuj du tagoj? Solidareco ne finiĝos dimanĉe vespere por la esperantistoj. Lunde kaj marde, ili havos eblecon konkretigi solidarecan projekton, rilate kun esperanto. Sed ili ankaŭ povos debati, interŝanĝi spertojn, kaj kompreneble promeni kaj ekskursi en la belega Parko Pilat.

Ni loĝos en agrabla gastejo en ok-hektara parko, kiu ankaŭ ebligos multajn sportojn. Rapide aliĝu se vi deziras dormi en ĉambro... Ankaŭ eblas tendumi ĉe la gastejo. Ĉiukaze aliĝu antaŭ la 30a de marto se vi volas ĝui plej malaltajn tarifojn!

La organiza teamo.

Les journées solidaires, kézaco ?

Vous êtes sans doute nombreux à avoir entendu ou lu les mots « Journées solidaires » (en espéranto, « solidaraj tagoj »), soit dans votre *JI*, soit à l'occasion de diverses rencontres ou réunions de jeunes. Mais de quoi s'agit-il au juste ? On a entendu tellement d'idées autour de ce projet que vous avez peut-être envie de poser cette question. Voici donc une petite explication.

Les journées solidaires sont une rencontre pour les jeunes organisée par Jefe, qui aura lieu du 30 juin au 5 juillet à Saint-Chamond (près de Lyon). Elles commenceront par un festival organisé par la ville même, « L'Humain en Fête », qui rassemblera les 1er et 2 juillet beaucoup d'associations de solidarité. Il y aura des organisations nationales bien connues : les Restos du Cœur, le Comité Catholique contre la Faim et pour le Développement, Terre des Hommes, le Secours Catholique, la Croix Rouge... Mais aussi des associations locales : Saint Chamond Espoir (solidarité avec des enfants malades), l'Arrafal (solidarité avec la Lituanie) etc. Enfin, la ville de Saint Chamond, la Maison des Jeunes et de la Culture (MJC) et plusieurs centres sociaux sont partie prenante de l'organisation.

Tous participeront à la fête, soit par des concerts, des jeux, de la jonglerie avec les enfants, des films, des expositions, des débats ou des dégustations... A travers cette fête ils essaieront aussi de collecter de l'argent, non pas pour eux-même, mais pour une caisse commune qui permettra ensuite de réaliser un projet humanitaire.

Les espérantophones participeront à ce festival comme toutes les autres associations, par un concert de JoMo, des ventes, des dégustations internationales, des cours d'espéranto, des contributions au débat, etc. Il sera aussi possible d'aider d'autres associations, par exemple en s'occupant des enfants. Bref, il y en aura pour tous les goûts !

Et après ces deux jours ? Pour les espérantophones la solidarité ne s'arrêtera pas dimanche soir. Lundi et mardi, ils auront la possibilité de concrétiser un projet de solidarité, en lien avec l'espéranto. Mais ils pourront aussi débattre, échanger des expériences, et bien sûr, participer à des promenades et excursions dans le superbe parc du Pilat.

Nous logerons dans un centre agréable, au milieu d'un parc de 8 hectares, qui permettra aussi diverses activités sportives. Inscrivez-vous vite si vous souhaitez dormir en chambre... mais vous pouvez aussi camper dans le parc du centre. Dans tous les cas, inscrivez-vous avant le 30 mars pour bénéficier du tarif le plus bas !

L'équipe organisatrice.

Espéranto et solidarité avec les victimes de guerre

Agado Espero : des projets soutenus par le compte « Espero »

Le compte « Espero » de UEA soutient depuis 7 ans les initiatives d'espérantistes visant à aider les victimes de conflits dans le monde. Il s'adresse prioritairement aux victimes espérantistes mais vise un public plus large dans le cadre de certains projets.

>> Financer les études d'un jeune Albanais du Kosovo.

Le premier projet, « stud-stipendio » a été imaginé par des espérantistes américains. Ceux-ci ont prévu de verser sur un compte-épargne une certaine somme pendant plusieurs années, jusqu'à atteindre quelques milliers de dollars. Cette somme sera alors allouée au financement des études d'un jeune Kosovar espérantophone ou de famille espérantiste, victime de la guerre. Le groupe cherche actuellement un candidat de 12-15 ans.

>> Acheminer des colis vers ceux qui n'ont plus rien.

Pour les millions de réfugiés du Kosovo privés de tout, des associations espérantistes et des individus ont collecté denrées alimentaires et produits de première nécessité avec l'intention de confectionner « 1000 familiaj pakajoj ». Ce sont finalement 1998 colis qui ont pu être envoyés à Sarajevo, Novi Grad et Hadzici. Les bénéficiaires (pas forcément espérantophones) ont également reçu un dépliant les informant en albanais et en bosniaque des objectifs de cette campagne.

>> Accueillir des réfugiés en France.

Un groupe d'espérantophones français (réunis par l'Amikeca Reto) s'est organisé pour recevoir en France des réfugiés des Balkans. Ce troisième projet est intitulé : « gastigado en Francujo ».

>> Se jumeler avec l'ex-Yougoslavie.

Le groupe d'espéranto de Ulm (Allemagne) propose d'aider à organiser le jumelage avec un club ou une ville d'ex-Yougoslavie dans le cadre de « Ĝemeloj en eks-Jugoslavi ».

Ce groupe a également ouvert un compte pour recevoir des dons destinés à l'aide d'urgence (ex : médicaments) pour tous sans distinction de langue ou d'ethnie.

>> Balkan Sunflowers (« balkanaj sunfloroj »).

Cette organisation gère le cinquième projet qui a pour but de coordonner les volontaires du monde entier qui travaillent sur place pour résorber peu à peu la crise des réfugiés et reconstruire la région des Balkans. Il n'est pas nécessaire d'avoir des connaissances techniques ou médicales mais une connaissance basique de l'anglais peut s'avérer utile. Il est envisageable de créer un groupe espérantophone.

Si l'un de ces projets vous intéresse, si vous voulez par exemple rejoindre notre ami Krayg qui participe aux « balkanaj sunfloroj », contactez Renato Corsetti qui coordonne ces actions pour UEA : Renato Corsetti, Colle Rasto, IT-00036 Palestrina, Italie ou corsetti@itelcad.it

Si vous voulez faire un don, c'est possible par le biais du « Konto Espero » de UEA. Vous pouvez indiquer clairement quel projet vous souhaitez soutenir (exemple : « por balkanaj sunfloroj »)

Karine Texier d'après Espéranto n°1116 et 1119 (juillet-août et novembre 1999)

Adresaro / Carnet d'adresses

✉ ★ ✉ ★ ✉ ★ ✉ ★ ✉ ★ ✉ ★ ✉ ★ ✉ ★

Contre la torture :

Amnesty International
Section Française
76 boulevard de la Villette
75940 Paris cedex 19
<http://www.amnesty.asso.fr>
Minitel : 3615 Amnesty
tél : 01 53 38 65 65
fax : 01 53 38 55 00

ACAT France
(Association des Chrétiens pour l'Abolition de la Torture)
7 rue Georges Lardennois
75019 Paris
<http://home.worldnet.fr/acatfr>
tél : 01 40 40 42 43
fax : 01 40 40 42 44
E-mail : acat-fr@worldnet.fr

World Organisation Against Torture
(Organisation mondiale contre la torture — en anglais)
<http://www.omct.org>

Solidarité et développement :

Artisans du monde
<http://www.globenet.org/artisans-du-monde/groupe.htm>

Agri Ici
14 passage Dubail
75010 Paris
Tél : 01 40 35 07 00
Fax : 01 40 35 06 20
E-mail : agirici@globenet.org

CCFD
Tél : 01 44 82 80 00

Max Havelaar
Tél : 01 42 87 70 21

Globenet
(L'Internet associatif et solidaire)
<http://www.globenet.org>

Emmaüs International
183 bis rue Vaillant Couturier
B.P. 91
F-94143 ALFORVILLE CEDEX
Tél : 33 (1) 48 93 29 50
Fax : 33 (1) 43 53 19 26

Réseau Solidarité
10 quai Richemont
35000 RENNES
Tél. : 02 99 30 60 53
Fax : 02 99 30 39 30
E-mail : reseau-solidarite@globenet.org

CRID
14 passage Dubail
75010 Paris
<http://www.globenet.org/crid>
Tél : 01 44 72 07 71
Fax : 01 44 72 06 84
E-mail : crid@globenet.org

✉ ★ ✉ ★ ✉ ★ ✉ ★ ✉ ★ ✉ ★ ✉ ★ ✉ ★

Ni legu esperante

Kiel esperantisto imagis la jaron 2000 antaŭ 30 jaroj

Scienca evoluo kaj la jaro 2000
(teksto verkita en 1971 de Henrik Maschler, Israelo kaj tiam premiita de "Esperanto").

Kiam la unua kosmonaŭto forveturis al la kosmo, venis ĵurnalistoj al lia domo por intervjui lian edzinon. Ŝi bedaŭrinde ne estis hejme. Ili renkontis nur la filon. La filo demandite pri siaj gepatroj diris: "Mia patro estas en la kosmo. Li revenos post 86 minutoj. Mia patrino iris aĉeti viandon, mi ne scias kiam ŝi revenos; dependas de tio, kiam oni alportos la viandon al la butikoj kaj kiom da aĉetantoj staras antaŭ ŝi en la vico".

Telefono deviga

La progreso: kiel bela vorto! Oni bezonas nur tiom da tempo por veturi al la luno, kiom antaŭ 200 jaroj daŭris la vojaĝo de Parizo al Amsterdamo. Ĉiu dua homo havas aŭtomobilon en Usono; la telefono fariĝis jam deviga objekto en ĉiu loĝejo. La informa servo de radio kaj televido dum kelkaj sekundoj informas la tutan mondon pri la gravaj eventoj. La loĝejoj estas pli kaj pli komfortaj. Komputiloj servas grandajn organizaĵojn kaj fabrikojn; la turismo fariĝis jam ĝenerala atingo de ĉiu loĝanto de la progresiva mondo. Kion do atendi plu? Jes, multo estas atendinda. La loĝejoj fariĝos pli grandaj, la mebloj estos pli komfortaj kaj malpezaj. La telefono estos anstataŭita de telefonvidilo kaj ne bezonos dratojn por kunligi la interparolantojn. Ĉiu homo havos en sia poŝo malgrandan ilon, kiu permesos al li kontaktiĝi kun iu ajn homo, kiu en tiu momento estos al li bezonata.

La loĝejoj havos konstantajn temperaturon, malsekecon, kaj lumon laŭ la deziro de loĝantoj. Ni vidos cen-

tojn da filmoj per nia televido laŭ nia elekto, sendepende, ĉu en tiu tempo ili estos dissendataj per la centra televiddissendilo. Ĉiu terglobano havos sian propran komputilon, kiu helpos al li, donante ĉiujn bezonatajn sciigojn kaj memorigante, kion li devas en la sama momento fari.

La veturiloj fariĝos pli rapidaj kaj komfortaj. La vojaĝo de Londono al Novzelando daŭros 43 minutojn. Ekstos submaraj urboj kaj minejoj. Ekskursoj al la norda kaj suda poluso estos atingeblaj por preskaŭ ĉiu homo. Jam estos eltrovita rimedo kontraŭ kancero kaj koratako, la infektaj malsanoj definitive malaperos...



Kiel bela futuro...! Sed...

La homoj fariĝos fremdaj

Samtempe kiam progresas la tekniko kaj la preciza scienco, ni ne vidas progreson de la sociaj sciencoj. Samtempe kiam la televido permesos al la homo aŭdi kaj vidi ĉiujn programerojn de la tuta

mondo, la plimulto de ili restos nekomprenoblaj pro la manko de komuna lingvo. La ekskursoj al aliaj landoj limiĝos nur al rigardado de pejzaĝoj sen interparolo kun alilandanoj. La progreso de literaturo limiĝos pro la sama kaŭzo. Kontaktoj inter la homoj fariĝos pli kaj pli maloftaj. La homo havante sin komfortan loĝejon kaj ĉion, kion li bezonas, pli kaj pli malofte forlasos ĝin por interbabili. La infanoj ne bezonos eliri al la lernejo, ĉar la televido alportos al ilia loĝejo la plej bonajn instruistojn. Finiĝos la bela periodo de amikiĝo dum la jaroj de knabeco kaj juneco. La homoj fariĝos fremdaj unu al aliaj. Eĉ la ekzamenojn ni povos fari per iu interkomunikilo.

La teatro perdos sian signifon, ĉar perfektigita, stereofona kaj stereoskopa televido ĝin anstataŭos. Simile la koncertoj venos hejmen al la konsumanto. Eble ĝis tiu tempo ne estos solvite la problemo de laborloko, kiu troviĝos ekster la loĝejo.

Steloj malfacile videblaj

La aero fariĝos pli kaj pli malpura. La ĉielo ne estos videbla, ĉar la malpura aero donos grizan koloron al nia supro. Ankaŭ la steloj estos malfacile videblaj. La suno estos videbla, sed ĝi havos pli flavan koloron kaj ne brilos kiel hodiaŭ; simile la luno — nia romantika akompananto — fariĝos pli pala, kaj ĝia lumo estos anstataŭita de elektra lumo, kiu tiam eble atingos la forton de la nuntempa suno.

(daŭriĝo kaj fino post tri monatoj!)

Atentigoj

La loĝantoj de transpagipovaj landoj sendu aliĝilon kaj antaŭpagon de 60 000 ITL; la aliaj sendu nur aliĝilon se ili aliĝas poŝte, sed se ili aliĝas persone ili antaŭpagu 20 000 ITL. Ĉiukaze via aliĝo validos (kaj vi povos certi pri via loko) nur post ricevo de konfirmo. Ne pre kunportu pruvilon de la antaŭpago. La kotizoj de ne-memzorgantoj inkluzivas programon, loĝadon en ĉambro kaj manĝadon ekde la vespermanĝo de la 19a ĝis la tagmanĝo de la 25a de aprilo. La kotizoj de memzorgantoj inkluzivas nur programon kaj loĝadon en aparta ejo.

Oni ne redonos la antaŭpagon al malaliĝintoj; oni redonos eventualan kroman pagon, nur se la malaliĝanto informos nin antaŭ la 31a de marto 2000. Eblas transdoni sian aliĝon al ne-aliĝinto, kondiĉe ke tiu prezentu skriban ateston de la transdoninto. Ni alĝustigos la kotizon, sed ĝi ne povos malaltiĝi. Ne eblas transdono de pluraj antaŭpagoj al sama persono. Por ĉiu persono necesas aparta aliĝilo: grupa aliĝo ne estos akceptata.

Sendu

Aliĝilon:

Manuel Giorgini, S. Polo 606, IT-30125 Venezia,

✉ ijf.admin@esperanto.it, ☎ (nur se urĝas) +39 041 5203245

Antaŭpagon:

- Bankokonto: Gioventù Esperantista Italiana, ABI: 3002, CAB: 2002, c/c: 650791/19, SWIFT: BROMIT 2V, Banca di Roma, Filiale di Venezia, Agenzia n. 8
- UEA-konto: ieja-z
- Per poŝtmandato adresita al Manuel Giorgini

Programkontribuojn:

- Temajn: Luka Bertero, Via Beaulard 47, IT-10139 Torino, ✉ amuk@freemail.it, ☎ +39 011 3851209
- Distrajn kaj vesperajn: Michela Concialdi, Vic. Broch 7, IT-31025 S. Lucia di Piave (TV), ✉ m_concialdi@yahoo.com, ☎ +39 0339 5845500 aŭ +39 0438 460028

Informpetojn pri TEJO kaj lingvo-politiko (prepare al tiutemaj programeroj):

Sandra Schweder, Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam,

✉ tejo-oficejo@esperanto.org, ☎ +31 10 4361044

✂ -----

Mi aliĝas al la 24a IJF kiel partoprenanto

Mi ricevos rabaton pro TEJO-aneco

tuttempa

Mi ŝatus loĝi kun _____

partatempa de _____ ĝis _____

Mi antaŭpagis _____ ITL

vegetarano memzorganto

(banke poŝte tra UEA

Mi bezonas invitleteron al Italio, do mi donas ĉiujn necesajn informojn - minimume:

pasportnumero _____ valida de _____ ĝis _____

kaj mi komprenas ke se mi ne havigos ilin antaŭ 28.02.2000 mi ne ricevos inviton

Mi proponas jenan kontribuon por la tema distra vespera programo:

Mi akceptas ĉiujn kondiĉojn.

Dato (TT.MM.JJ)

Subskribo

Internacia Seminario pri Eŭropa Integriĝo Internacia Junulara Festivalo



"Ĉu esti aŭ ne esti Eŭropano?"

Cavallino (Venezia), Italio
De la 19a ĝis la 25a de aprilo 2000



tejo

tutmonda esperantista junulara organizo



itala esperantista junularo

*La aranĝo estas subtenata de la
Eŭropa Junulara Fondaĵo*

Council of Europe
Conseil de l'Europe



Fondation Européenne
de la Jeunesse

"Ĉu esti aŭ ne esti Eŭropano?"

Kio estas eŭropa kulturo? Ĉu ĝi ekzistas? Kiel rilatas unu al la alia la Eŭropo de Eŭropa Unio kaj la Eŭropo de la Konsilio de Eŭropo? Ĉu vi mem havas rolon en Eŭropo? Ĉu vi mem estas eŭropano, ekstereŭropano, mondĉivitano, vilaĝano... esperantisto?! La seminaria programo celas respondi tiajn ĉi demandojn.

La ĉi-jara IJF havas aldonan dimension: ĝin organizas ne nur IEF sed ankaŭ TEJO, kaj ĝin subvencias la Eŭropa Junulara Fondado de la Konsilio de Eŭropo. Do ni povas proponi pli bonajn kondiĉojn, kaj ni esperas havi pli multnacian partoprenantaron. Post la pasintjara sukcesego ni daŭrigos la kunlaboron kun la Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino, kiu okazigos studsesiojn, kaj ni aranĝos altkvalitan internacian E-kurson.

Kaj kompreneble ankaŭ ĉi-jare ni havos riĉajn distran kaj vesperan programojn, por doni amuzon por ĉies ŝatoj en varma esperanta-itala etoso!

La ejo

La 24a IJF okazos en kongresvilaĝo kun privata plaĝo ĉe la limo inter la Adriatika Maro kaj la Venecia Laguno. La strukturo tre taŭgas ankaŭ por plenaĝuloj, tutaj familioj kaj handikapuloj. La adreso estas: Villaggio San Paolo – Via Radaelli – Cavallino (VE), ☎ +39 041 968049.

Kiel alveni aŭte: Eliru la aŭtoŝoseon A4 (en San Donà di Piave se vi venas de Trieste, en Quarto d'Altino se vi venas de Venezia) kaj sekvu la indikojn por Jesolo. Apud Jesolo sekvu la indikojn por Punta Sabbioni. 500 metrojn post la kruciĝo ĉe Ca' Ballarin estas Via Radaelli (maldekstre).

Kiel alveni trajne: De Trieste prenu trajnon ĝis San Donà di Piave, poste buson ĝis Jesolo – Piazza Drago kaj de tie buson n-ro 5 (direkto Punta Sabbioni) kaj haltu en Via Radaelli. De Venezia Mestre prenu buson ĝis Jesolo – Piazza Drago kaj sekvu la suprajn instrukciojn.

Kiel alveni ŝipe: De Venezia prenu ŝipon al Punta Sabbioni kaj de tie buson n-ro 5 (direkto Jesolo) ĝis Via Radaelli.

Kotizoj

Estas 4 landokategorioj, faritaj laŭ la riĉeco kaj la distanco de Italio. La kotizoj estas en miloj da liroj (mil liroj estas iomete pli ol unu germana marko). La aliĝperiodoj estas:

A Ĝis 31.01.2000

B De 01.02 ĝis 31.03.2000

C Poste / surloke

Kaze de partatempa restado, la kotizo de nememzorgantoj estas tiu de la aliĝperiodo C por iliaj lando- kaj aĝokategorio, dividita per 6 kaj obligita per la nombro de tranoktoj. Memzorgantoj pagas ĉiukaze la tuttempan kotizon.

Krompagoj kaj rabatoj:

- Ĉiu kiu petos invitleteron (nepre antaŭ 28.02.2000) devos kontribui al niaj elspezoj per 5 000 ITL
- La italoj ne anoj de IEF/IEJ devos krompagi 50 000 ITL (eĉ por unu sola tago) aŭ aniĝi surloke
- Por 1- aŭ 2-persona ĉambro la krompago estas 10 000 ITL tage
- Individuaj Membroj kaj Patronoj de TEJO (eblas aniĝi surloke) kaj Subtenantoj de IEF ricevos 10%-an rabaton
- La kontribuantoj al la programo ricevos rabaton laŭ interkonsento

Repago de vojaĝkostoj

Ni disponas je ebleco subvencii iom da vojaĝkostoj. Prioritaton havos karavanoj, sed ankaŭ unuopuloj el landoj ne tre reprezentataj ĉe nia aranĝo. Bonvolu informiĝi anticipe ĉe la IJF-administranto pri la ebleco surloke ricevi kontribuon!

Kotiztabelo

LOĜLANDO	ALIĜ- PERIODO	KOTIZO				Mem- zorg- antoj:
		Ne memzorgantoj (Aĝo je 19:04.2000):				
		0-19	20-24	25-29	30 +	
Aŭstrio, Belgio, Danlando, Francio, Germanio, Italio, Liĥtenŝtejno, Luksemburgo, Monako, Nederlando, Sanmarino, Svislando, Vatikano	A	150	180	215	260	80
	B	170	205	245	295	
	C	195	230	275	330	
Andoro, Britio, Finnlando, Malto, Norvegio, Svedio	A	130	160	190	225	
	B	150	180	215	255	
	C	170	200	240	285	
Aŭstralio, Ĉeĥio, Greklando, Hispanio, Hungario, Irlando, Islando, Israelo, Japanio, Kanado, Kroatio, Novzelando, Pollando, Portugalio, Singapuro, Slovakio, Slovenio, Sudkoreio, Tajvano, Usono	A	115	135	165	195	40
	B	130	155	185	220	
	C	145	175	210	250	
Ĉiuj ceteraj	A	100	120	145	170	
	B	115	135	160	195	
	C	125	150	180	215	

En la aliĝilo kaj en ĉiuj komunikoj, bonvolu skribi latin-preslitere!

✂ -----

Nomo

Naskiĝdato (TT.MM.JJ)

Sekso: Ina Malina

Strato

Poŝtkodo

Urbo

Loĝlando (esperante)

Telefono (internacie)

Retadreso

Mi volas ke sur mia nomŝildo aperu jena alia lando anstataŭ mia loĝlando:

SPORTA

-Semajnfino

1-3 septembro 2000 • Epinal



*Ekkonu la voĝojn ...
... per la sportoj!*

